

Nia kvaronjarcenta esperantisteco, 3-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 739, 1977.12.07 & 09 & 10

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Antaŭ ekzakte 25 jaroj mi komencis praktiki esperanton. Por iel marki tiun ĉi personan eventon, mi prezentas dum kelkaj prelegoj rememorojn aŭtobiografiajn.

Sociologia karakterizaĵo de la esperanto-movado estas ĝia tendenco tuj asimili la novajn labor-fortojn. Kvin monatojn post la eklerno de la lingvo mi partoprenis en 1953 la jarkunvenon de Svisa Esperanto-Societo, kaj mi revenis hejmen kun la titolo **sekretario franclingva de la junular-sekcio**. Neniu kontrolis, ĉu lingve aŭ ofice, mi estis kvalifikita por plenumi la antaŭviditan taskon.

Du monatojn poste, en majo 1953, mi ĉeestis en Baden jarkunvenon de tiu ĉi junular-sekcio, kies franclingva sekretario mi estis. Kaj mi estis elektita vicprezidanto, verŝajne ĉar kun miaj 21 jaroj mi estis la plej juna kaj ĉar mi estis la nura franclingvano. Tiu ĉi badena junulara kunveno lasis al mi malagrablan rememoron. Mi malkovris, ke la esperanto-junularo ne estis tre juna. Ĝi fakte grupigis maksimume 10 agemulojn baldaŭ tridekjaraj. La plej aktiva, la sorĉisto Hoho, estis ĵus akceptinta la prezidon de la plenkreskula Svisa Esperanto-Societo, kio krizigis la junularon. Grandan seniluziigon mi tiam sentis, despli ke la kunveno en si mem estis teda. Kaj la plej agrablan parton mi ne povis partopreni. La kunven-aliĝilo promesis repagon de parto de la veturkostoj, kaj mi vere kalkulis je tiu ĉi monhelpo por pagi mian tagmanĝon. Bedaŭrinde la maljunaj gejunuloj decidis, ke tiu ĉi repago ne estas necesa. Por mi tiu ĉi decido signifis, ke mi ne povos partopreni la tagmanĝon. Mi rezignis almozpeti, kaj kiam anonciĝis la manĝo, mi iris promeni. Mi aĉetis bulkon kun miaj lastaj moneroj kaj mi sensoifiĝis ĉe fontano. Mi tiam ĵuris al mi, ke se foje mi respondecos pri renkontiĝo, neniam io simila reokazos al senmona junulo.

Fakte mi bezonis du jarojn por vere konvinkiĝi pri la reala valoro de esperanto. Mi ĉefe serĉis kontaktojn kun aliaj gejunuloj en la kadro de la TEJO-kongresoj, kaj la 10-a, kiu en 1954 veturigis min al Hilversum (Nederlando), estis por mi decidiga. Mi ĉiam memoros vesperan diskuton, kiu disvolviĝis ĉirkaŭ pingpona tablo ; tiam ni ne estis sufiĉe riĉaj por renkontiĝi en trinkejoj kaj ni improvizis niajn kunsidojn en sportejo, kie ni tranoktis. Dekkvarope ni vigle rekonstruis la mondon. Kiel komencanto mi malfacile esprimis miajn ideojn, tial mi franlingve turniĝis al sidanto, kiun mi opiniis franco, por informiĝi pri nekonata vorto. Li mire rigardis min. Montriĝis, ke li estis svedo. Altstatura blondulo, kiun mi ĝuste kredis svedo, helpis min. Li fakte estis franco. Li faris interesan proponon : ke ni nin vice prezentu, kaj mi malkovris, ke ne nur ni reprezentis pli ol 10 naciajn lingvojn, sed ke fakte neniu vere personigis la bildon, kiun mi havis pri la koncerna popolo. La italo estis flegma dikventrulo, kiu karikaturis germanon, dum la 2 germanoj estis gestemaj kaj nigr-haraj kiel mi imagis la italojn. La humurplena ruĝharulo ne estis anglo, sed aŭstro. Mi tiam konvinkiĝis ne nur pri la eksterordinara vivanteco de esperanto, sed ankaŭ pri la neadekvateco de la bildoj, kiujn ni havas en nia menso pri la aliaj popoloj.

Post Hilversum mia poresperanta konvinko ludis kunigan rolon. Ĉirkaŭ mi grupiĝis la gejunuloj, kaj en marto 1955 mi oficiale fariĝis ilia estro okaze de la jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo. Mi tuj komencis organizi semajnfinaĵajn renkontiĝojn. Ni tranoktis en junularaj gastejoj aŭ sur la planko de klasĉambro. Ni multe marŝis, vizitante natur-protektejojn, malkovrante nekonatajn regionojn de nia lando sub la gvidado de unu el ni.

Vespere ni kantis, ŝerci, sorĉis. Prelegojn ni improvizis en la naturo, kiam la vetero estis bela aŭ en gastejo, kiam pluvis. Fonduson por la repago de la vojaĝkostoj ni kreis dank'al la aldonaj partoprenkotizoj de la olduloj, tio estas de la pli ol tridekjaraj partoprenantoj.

La membraro de nia asocio, kiun ni optimisme nomis Esperanto-Junularo de Svislando, rapide kaj kuraĝige kreskis. Kaj dank'al la regulaj kunvenoj ni progresis en la praktiko de la lingvo. Ni tiam eksentis la bezonon de pli longaj restadoj, kaj de la 23-a de decembro 1956 ĝis la 5-a de januaro 1957 okazis la unua skiferio en Adelboden. De la mateno ĝis la vespero ni provis ne krokodili, eĉ dum la disputoj. Profundaj amikecoj naskiĝis. Geedziĝoj anonciĝis, interalie la mia.

Ĉirkaŭ tiu ĉi aktiveco iom post iom naskiĝis gravaj agadoj, kies konkludo estos la kreo de Esperanto-Edukistaro kaj poste de Kultura Centro Esperantista. Sed pri tio ni havos la okazon raporti venontan semajnon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012*